Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 23 – 26 novembro

# Migranta Hirundo

7-a de decembro 2023, numero 7

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Post-VK-a mesaĝo: demandaro, subteno

Ni invitas vin dividi kun ni viajn impresojn pere de la post-VK-a demandaro: https://mallonge.net/VK2023 – ĝi estas rapide respondebla.

Ĉiu registrita enhavo de la VK ankoraŭ disponeblas por spektado en nia virtuala kongresejo: https://vk.retevent.com – ĝis la 31-a de decembro!



Se vi volas rekomendi la enhavon al amikoj, ankoraŭ eblas aliĝi per la VK-aliĝilo: http://vk.esperanto.net – denove senpage por individuaj membroj de UEA!

Subtenu la laboron de UEA per aliĝo: https://uea.org/alighoj/alighilo – jam eblas aliĝi por 2024! Kaj se vi volas dankdonaci pro la VK, eblas tion fari konstante per https://uea.org/alighoj/donacoj/vk – koran dankon!

## Karakterizaĵoj de Esperanta Morfologio

*laŭ vidpunkto de korea lingvisto-esperantisto*

En la Reta Revuo aperis ampleksa artikolo de D-ro BAK Giwan (E-profesoro de la Esperanta Fako de Zaozhuang-Universitato, Ĉinio) kun la titolo “Karakterizaĵoj de Esperanta Morfologio” (*laŭ vidpunkto de korea lingvisto-esperantisto*). Vi povas libere legi ĝin uzante tiun ĉi ligilon: https://revuoesperanto.org/morfologio

## La Brazila Kolekto

Dankon al ĉiuj, kiuj spektis la prelegon pri Brazila Kolekto dum la 4-a VK!

En Brazila Kolekto aperis nova video de la bela kanto «Kiso tranĉita» (originale «Beijo partido»), verkita de Toninho Horta: https://mallonge.net/16u.




Kaj vi estas invitata ekricevi nian senpagan novaĵleteron, por informiĝi ĉiusemajne pri la plej freŝaj aldonaĵoj al nia retejo:
https://brazilakolekto.com/novajletero.

## Reta renkontiĝo en BrazilMuzika Klubo

Ĉiumonate okazas perreta Renkontiĝo en BrazilMuzika Klubo, kaj ĝi estas malferma al ĉiuj esperantistoj de la mondo!

Dum tiu unuhora kunveno oni kantas, ludas, parolas pri brazila muziko aŭ simple aŭskultas.

La venonta okazos la 9-an de decembro, je la 9-a horo (laŭ UTC -3), kaj por eniri tiam klaku ĉi tie: https://mallonge.net/17t

Venu! Ĝuu tiun etoson!



# Ankaŭ vi povos legi dum la Tago de la Esperanta Libro

★ Alessandra Madella

Jen artikolo pri la Tago de la Esperanta Libro 2023 en *UEA.facila* kun kunligoj por elŝuti la tekstojn.

Bonvolu sendi al ni fotojn kaj raportojn por *Internacia Pedagogia Revuo* de via komuna legado tra la mondo!



Sekvu la ligilon: https://mallonge.net/16z

# Pri la libera programaro en Esperanto

La Free Software Foundation Europe (FSFE) publikigis filmeton en Esperanto pri "Kio estas libera programaro (https://mallonge.net/170)?" (Pri malfermitkoda programaro en Esperanta Vikipedio: https://mallonge.net/171 ).

La kvar liberecoj klarigitaj en malpli ol 3 minutoj. Libera programaro garantias al vi la kvar neprajn liberecojn uzi, studi, kunhavigi kaj plibonigi la programaron. Ĉi tiuj rajtoj kiuj difinas programaran liberecon, subtenas aliajn fundamentajn liberecojn, kiel la libereco de esprimo, gazetaro kaj privateco.

Oni klarigas en malpli ol 3 minutoj kial ĉi tio bonas kaj kion ĝi signifas. Komentoj aldonindas. Jen la ligilo al la filmeto:
https://mallonge.net/172



# Internacia literatura Esperanta konkurso "Hristo Gorov-Hrima" – 2024

★ Georgi Mihalkov

Hristo Gorov-Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por ***rakonto kaj eseo.***

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkita en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj, formato A4, la literoj estu Times New Roman – 12 punktaj.



**La gajnintoj ricevos valorajn premiojn!**

*Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2024 al Georgi Mihalkov, prezidanto de la ĵurio, retadreso: modest.mihalkov@gmail.com*


## Fondaĵo Canuto

**Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!**

# La Kongreso de ILEI en 2024 okazos en Brazilo

Unuafoje la 57-a Kongreso de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Brazilo, en la bela, turisma urbo Maceió en la brazila nordoriento. Konata kiel 'Rideto-Urbo' (Cidade Sorriso) pro la popolo ĉiam ridetanta kaj 'Akva Paradizo' (Paraíso das águas) pro tio, ke ĝi estas ĉirkaŭata de lagetoj, riveroj kaj la Atlantika Oceano, Maceió troviĝas inter la urboj plej vizitataj de turistoj enlandaj kaj eksterlandaj. Kun ĉirkaŭ 40 kilometroj da strandoj kun mirindaj plaĝoj kaj naturaj naĝejoj, Maceió kaj najbaraj urboj atendas vin kaj viajn familianojn por ekskursi kaj ĝui diversajn aktivaĵojn kaj dum la vesperiĝo admiri spektaklajn sunsubirojn sidante ĉe kioskoj kaj trinkante kokosakvon kaj manĝante tipajn frandaĵojn. Hoteloj kaj gastejoj por ĉies gustoj abundas kaj multaj, fronte al la oceano, restigas turistojn kaj revenigas ilin al Maceió pro la ravantaj pejzaĝoj. La urbo jam gastigis du naciajn kaj du junularajn kongresojn. La 57-a ILEI-kongreso estos la unua internacia Esperanto-evento ĉi tie kaj ni esperas, ke ĝi estos mirinda kaj neforgesebla ne nur por vi, kiuj kunsidos kun ni dum prelegoj, debatoj, atelieroj, konversaciaj rondoj kaj aliaj programeroj, sed ankaŭ por viaj familianoj kaj geamikoj neesperantistaj. Bonvenon al Maceió! La 'Akva paradizo' atendas vin! Informis Laura Brazzabeni, kongresoj en ILEI.

*El Internacia Pedagogia Revuo 2023/4*

# Pri la enhavo de *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) 2023/4 (Jarkolekto 53)

★ Jozefo Németh, redaktoro

## Enhavo


- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- Sara KONNERTH, Renardo FÖSSMEIER: Esperanto en la universitato de Sibio […] p.4
- Augusto Casquero, 1945 – 2023 (nekrologo verkita de Dennis KEEFE) p.9
- Mónika MOLNÁR: Unika projekto kun konkretaj rezultoj p.15
- László SZILVÁSI: Lingvolernado per danc-tapiŝoj p.20
- Intervjuo kun Maximiliano Garcia (Alessandra MADELLA) p.24
- Petr CHRDLE: Mia vivo kun Esperanto (fragmentoj de la libro) p.27
- A. MADELLA La Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato dekjariĝas p.31
- Alessandra MADELLA: Pri la novaj lingvaj paĝoj en la retejo de ILEI p.34
- El la landoj kaj sekcioj (BE, BI, CN, DE, HR, HU, JP, PL, RS) p.36
- La fruktoj de agado per unu simpla komputilo (Stefan MacGill) p.47
- Voĉdonu por la retaj ekzamendatoj de KER […] (Katalin KOVÁTS) p.48
- Leterkesto (reago de Gerald TUCKER) p.49
- Informoj pri ILEI, redakcioj informoj p.51
- 57-a Kongreso de ILEI – Maceió 2024 (alvoko, aliĝilo) p.52


Adreso de la nova arkivo de IPR: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.

**Noto:** ekde 2023 la ligojn al la retaj versioj de IPR aŭtomate ricevas ankaŭ la abonantoj de la papera versio.


**Speciala oferto!**

Okaze de la jarŝanĝaj festoj dum la tuta decembro ni ofertas la kompaktdiskon

**... dum kristnaska tempo**
**de Ralph Glomp**

kun sesona rabato, sendepende de la mendata kvanto.



# Lingvistoj elektis urbon kun Esperanta aktiveco

★ Prof. dr hab. Ilona Koutny,
Universitato A. Mickiewicz

La kvinjare okazanta *International Congress of Linguists* okazos en Poznano septembre de 2024 (https://icl2024poznan.pl), organizata de la Universitato Adam Mickiewicz. Estas bona eblo kaj prestiĝo organizi kadre de ĝi atelieron pri interlingvistiko, ja ĉi tie interlingvistiko jam havas 25-jaran tradicion.

Ĝoje mi anoncas ke la propono por Interlingvistika laborsesio estas akceptita. Vidu la anoncon (workshops): https://icl2024poznan.pl/?id=2

Mi esperas ke iuj el vi povos kontribui al la pliriĉigo de la programo. La prelegoj povas esti angle aŭ pole. Verŝajne, ESF povos iom helpi finance. Tio donos eblon al vi viziti la lastan etapon de la nunaj kaj lastaj Interlingvistikaj Studoj kaj semajnfine la kulturan festivalon Arkones (arkones.org).

*El EKO 2023 / 68*



Ni dankegas nian karan **Rob Moerbeek**, kiu provlegis la numerojn de la *Migranta Hirundo*. Tio estas tre granda kaj fervora laboro!

# Videaĵo pri Esperanto-Plus

★ Adjévi Adjé



Mi volas uzi tiun ĉi okazon por kore danki al vi ĉiuj, kiuj venis al miaj prezentoj dum la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto.

Aperis nova videaĵo pri Esperanto-Plus, kaj mi kore invitas vin spekti ĝin ĉe: https://mallonge.net/173. Temas pri 2-minuta voĉa kaj skriba prezento.

Bonvolu aboni la jutuban kanalon por informiĝi regule pri niaj plej freŝdataj afiŝoj tie.

Kaj se vi ne ĉeestis miajn prezentaĵojn aŭ ĉeestis, sed vi deziras ricevi la prezentitajn materialojn, mi volonte sendos al vi. Bv. skribi al *contact.adjevi@gmail.com*.



# Nia kato – Kajto

Spektu ĉe Jutubo:
https://youtu.be/95FypBhs2Ms
Kantoteksto de Tomas Frejarö. La kantoteksto gajnis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj-2023.

